WIKIPEDIA

Moldava lingvo

La **moldava lingvo** estas speco de la rumana lingvo, parolata en Moldavio. Ĉirkaŭ du trionoj de moldavianoj dum censo respondis, ke ili parolas la rumanan lingvon, dum la cetera triono nomas *fakte la saman lingvon* la moldava*.

En Rusio, Ĉednestrio kaj Ukraino moldava lingvo estas rigardata kiel sama lingvo.

Statuso de la moldava lingvo

Inter la moldava kaj rumana lingvoj apenaŭ ekzistas diferencoj; la Moldava Akademio de Sciencoj oficiale informas (i. a. en sia paĝaro), ke la moldava fakte egalas al la rumana. Tamen la politika registaro de Moldavio insistas pri aparteco de la moldava lingvo.

La gravecon de la lingva statuso eble montras la fakto, ke la himno de Moldavio nomiĝas Limba noastră (= nia lingvo).

Skribsistemo

Historie la rumana lingvo uzis cirilan skribsistemon, sed poste la parto parolata en Rumanio transiris al la latina alfabeto. La cirila skribsistemo konserviĝis en sovetia Moldavio, sed post la sendependiĝo, pro la ondo de rumanema eŭforio, la alfabeto estis ŝanĝita fakte al la rumana (kun kelkaj pli regulaj uzoj, ol en la rumana). Tamen la cirila skribsistemo plu estas konservata i.a. inter la ŝatantoj de la moldava kulturo kaj lingvo kaj ĉe la gazeto *Adevărul Nistrean*.

Lingvo	
	Lingvistiko • Interlingvistiko • Planlingvo • Lingvaj familioj • Lingva filono • Senparenca lingvo
Listoj	alfabetorde • laŭ ISO 639 • laŭ familio • laŭ parolantaro • laŭ skribsistemo
Diverslingve	nombroj • Saluti • danki • idiotismo kaj idiotismaj esprimoj

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Moldava_lingvo&oldid=6973636"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 11:34, 5 jun. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.